

Artikolo de Eugène Egger pri la
Tendencoj kaj perspektivoj de la Eŭropa Edukado
en la dua kajero de *Eŭropa Dokumentaro*
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 562, 1974.07.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la dua kajero de *Eŭropa Dokumentaro* sinjoro Eugène Egger, la ĝenerala sekretario de la Svisa Konferenco de Kantonaj Publikinstruaj Direktoroj kaj la gvidanto de la Svisa Centro por Dokumentado pri Instruo kaj Edukado, kies sidejo troviĝas en Ĝenevo, publikigis interesan artikolon pri la **Tendencoj kaj perspektivoj de la eŭropa edukado**.

A.- Tiel sinjoro Eugène Egger mem resumas la grandajn tendencojn de la en-eŭropa edukado.
« *Tiuj tendencoj manifestas emon :*

Cl.- *socialigi la lernejon per individuigo de la instruado ;*

A.- *demokratigi la edukadon dank'al la partoprena sistemo ;*

Cl.- *restrukturigi la instruadon surbaze de la ĉioampleksa lernejo en la tuta eduka organizo ;*

A.- *akcepti la ideon de konstanta edukiĝo :*

Cl.- *formi novan titpon de instrusito, kiu estu samtempe edukisto kaj teknikisto pedagogia. »*

A.- Jen citaĵoj el la diroj de sinjoro Eugène Egger koncerne la restrukturadon de la instruado, kiu vere karakterizas nian epokon :

Cl.- « *Koncerne la strukturojn, oni riproĉas la malnovajn, ke ili estas rigidaj kaj ŝlositaj ; tial oni postulis pli da tralasado, tio estas anstataŭigi la antaŭajn vertikalajn strukturojn per horizontalaj, kreante ĉioamplersajn lernejojn. Tiel oni esperis, ke malaperos la diskriminacio kontraŭ teknikaj kaj praktikaj instrutipoj, kio samfakte forigus – oni imagis – la diskriminacion inter sociaj klasoj, ofte bazitan sur la instrunivelo. La Jarcento de Lumoj bedaŭrinde ne nur preparis la Francan Revolucion kun ĝiaj principoj de Libereco, Egaleco, Frateco, sed ankaŭ tiun dividon de la socio en personojn kulturitajn kaj nekulturitajn, kiu ebligis al la nova burĝa klaso meti la manojn sur la altajn instruejojn.*

A.- *Ŝanĝante la lerneajn strukturojn, oni baldaŭ konstatis, ke okazas interferoj de unu grado al alia ; tial, por respondi je la postulo de fleksebleco, kiu sola ebligis kontinuan reformadon, oni eksentis la bezonon komplete plani la edukadon : ekde la antaŭlerneja ĝis la postduagrada. La pedagogoj proponis forlasi jen la lernejjaron, jen la lernejaĝon, jen la fiksitan hortabelon, ktp, tiel ke la pridubado etendiĝis de la strukturoj al la metodoj kaj enhavo de la instruado, kaj al la maniero taksi la nivelojn de instruiteco. Reasertiĝis, ke socialigi la instruadon oni povas nur adoptante la principon de individuigo, realigante laŭmezuran lernejon, ĉu per laŭnivelaĵoj, ĉu per elekteblaj fakoj. Tia diversigo tamen ne povis respondi al ĉiuj novaj bezonoj ; oni sekve ekpostulis la enkondukon de novaj fakoj aŭ celoj : edukado pri konsumanteco, pri amas-informiloj, pri familia vivo. [...] Rezulte, pro timo troŝargi la programojn, oni sub premo atingis punkton, kiam necesis rekonsideri la tuton de la studplanoj laŭ interfaka aliro al la problemoj, kio devigis je elektoj el la stud-*

materialo. Cetere, kaj rilate el ĉi tiu aspekto, notindas la klopodoj farataj por aktualigi la enhavojn. [...] »

Cl.- Poste sinjoro Eugène Egger pritraktas la temon **konstanta edukiĝo**. Jen citaĵoj el liaj diroj :

A.- « Deirante de la nunaj viv-, labor- kaj esplor-kondiĉoj, la lernejo renovigas sian vizaĝon kaj anstataŭigas la kursojn per gruplaboro kaj esploro individua. **Lernigi la arton lerni** fariĝis la ĉefa celo de la lernejo, kaj per ĝi ni alvenas al la [...] granda tendenco de la eŭropa lernejo : ebligi **konstantan edukiĝon**, aŭ ripetitan edukiĝon. Per tio kompreniĝas la propono farata al ĉiu – en iu ajn momento de ties vivo – profesie aŭ kulture plialtiĝi. La karakteriza akcelo de la moderna vivo kun la rapidaj ŝanĝoj, kiujn ĝi alportas en la mondon de produktado, tekniko kaj scienco, implicas la neceson de konstantaj ĝisdatigo kaj profesia reorientiĝo interne de ĉiu okupo kaj en la tuta ekonomio de ĉiuj nacioj. Cetere nia multlibertempa socio, en kiu aperas iagrada liberiĝo disde la devigaj taskoj, devas zorgi pri la manieroj stimulasi la sociajn kaj kulturajn agadojn, kiuj ebligas al la homo fariĝi si mem, tio estas iĝi efektive libera.

Cl.- Tia lernejsreformo necesigas novan tipon de instruisto kaj originalajn instruteknikojn. Jen do la [...] tendenco : **reformi la trejnadon de la instruistaro**, kio protulas profundigi la psikopedagogian preparadon, enkonduki socialajn spertojn, konigi novajn komunik-teknikojn. **La instruisto de hodiaŭ, morgaŭ estos edukisto** titolas publikaĵo de R. Dottrens ; la lernigisto ankaŭ iĝos fakulo pri komunikado. Tio ĉi implicas ŝanĝon en la rilatoj inter instruanto kaj lernanto, inter lernejo kaj vivejo, direkte al tiu **pozitiva kunkompromitiĝo**, kiu devas estiĝi kunkredon je neŝanĝeblaj valoroj kaj ĉiurilatan malfermiĝon al la mondo. »

A.- Se vi deziras relegi tiun artikolon de sinjoro Eugène Egger pri la tendencoj kaj perspektivoj de eŭropa edukado, el kiu ni citis kelkajn erojn, vi trovos ĝin en la dua kajero de la revuo *Eŭropa Dokumentaro*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!